

ĈEA-Retkomunikoj 2017/05

Estimata leganto,

permesu al ni saluti vin en tempo antaŭ Kristnasko. En tiu ĉi numero ni ŝatus inviti vin al kelkaj antaŭkristnaskaj eventoj. Sed vi trovos ankaŭ interesajn ligilojn al multmediaj novaĵoj. Do, agrablan legadon!



Multmediaj novaĵoj

1. Aktualaĵoj en la retejo Esperanto.cz

[Výstupy z konference ČES v Kroměříži \(Materialoj el la ĈEA-Konferenco en Kroměříž\)](#)

plejparte ĉeĥlingve



La konferencon, okazintan inter 13.-

15.10.2017 en la Ĉefepiskopa gimnazio en la UNESCO-urbo [Kroměříž](#), ĉeestis 85 partoprenantoj el la tuta Ĉeĥio kaj gastoj el Slovakio kaj Pollando.

El ĝia programo nun disponeblas pluraj multmediaj materialoj: krom la rezolucio kaj artikoloj pri la aranĝoj (unu Esperanta), pluraj agadraportoj (unu Esperanta), fotogalerio, radioelsendo, videoregistraĵoj de la prelego pri d-ro Zamenhof de Jana Křížková kaj de la "Festa parolo" de Max Kašparů, fiktiva letero de la verkisto Alois Jirásek el 1927 kun aktuala mesaĝo kaj la artikolo de Viktor Dvořák "Ne timu prelegi".

[Videoj el la programo de UK en Seulo](#)

Kompilaĵo de retligiloj al remendataj videoregistraĵoj el la programo de la kongreso - labora, kleriga, kultura kaj turisma, inkl. videojn pri SAT-Kongreso kaj ILEI-Konferencon kaj pri Suda Koreio ĝenerale.

[Muzikgrupo NOPROBLEM koncertis dum Ĉelima Aŭtuna Renkontiĝo 2017](#)

Moravia folkmuzika grupo NOPROBLEM KOSTELEC NA HANÉ (en Esperanto SENPROBLEME), kiu orientiĝas ĉefe pri spiritualoj kaj pri popolkantoj el britaj insuloj (al ĉefaj aŭskultantoj grandparte konataj el la repertuaro de la konata ensemblo „Spirituál kvintet“), sukcese koncertis la 11-an de novembro 2017 en Tešino.

[Legolibretoj por senpaga elŝuto](#)

Sep volumoj de vere legindaj buntenhavaj LEGOLIBRETOJ (el 2003-2012), redaktataj kaj eldonataj de Jindřiška Drahotová, disponeblas por via libera uzo!

[O esperantu v českých médiích v říjnu 2017 \(Pri Esperanto en la ĉeĥaj amaskomunikiloj en oktobro 2017\) - ĈEĤLINGVE](#)

Intervjuo kun Petr Chrdle en la gazeto "Respekt" kaj du radioelsendoj kun Miroslav Malovec kaj Marek Blahuš.

2. Muzea paĝo ĉe Ipernity

Pli ol 2000 multmediaj dosieroj en 54 albumoj

Albumo [La 102a UK en Seulo 2017 kaj ceteraj kongresoj en la Suda Koreio](#) kun fotoj, inkl. videon [kvaronhora "Malneta resumo de la kongreso"](#) kaj kanton el la koncerto de Ĵomart kaj Nataŝa: "[Al Loko De Kie Blovas Vent'](#)" tradukitan el la korea lingvo.

3. Novaj sonartikoloj de la [Esperanta Retradio](#)

Ĉiutage aperas nova kelkminuta programo pri iu interesa temo, kun paralela teksto por pli bona kompreno!

Novaj registraĵoj de Jaroslava Malá:

Grekaĵoj

[Meleagro 20.10.](#)

[Gyges kaj la ringo 27.10.](#)

[Eroso kaj Psiĥo 3.11.](#)

[Artikolo pri Natria bikarbonato 10.11.](#)



4. Fotaĵoj el la Solenaĵo okaze de la 25jariĝo de la eldonejo [KAVA-PECH](#),

sukcese okazinta 13.11.2017 en Prago. Ni ofertas al vi [fotogalerion](#) de la solenaĵo. Senpagan neregulan bultenon kun informoj pri porokazaj rabatoj (validaj ĝis 31.12.2017) eblas peti ĉe chrdle@kava-pech.cz



5. La 11minuta filmo "Patrino"

de la ĈEA-membroj Pavol Kaščák kaj Rostislav Čubok akiris dum la Dua festivalo de Esperantaj filmoj "Teo kaj amo" (<http://esperanto.cri.cn/filme/>), okazanta en Ĉinio, unu el 10 premioj de la publiko kaj aperis en la nomumo por specialaj premioj pri scenaro, ĉefa aktorino kaj internacia kunlaboro. Elkoran gratulon! La konkurson partoprenis ĉi-jare 77 filmoj el 27 landoj de 4 kontinentoj. Niaj premiitoj partoprenis la festivalon kun buntenhava Premidona ceremonio, kiu okazis la 26-an de oktobro 2017 en la ĉina urbo Dušan kaj kiun vi povas spekti en [tiu ĉi video](#). Prezentis sin en ĝi ankaŭ la UEA-prezidanto Mark Fettes kaj la pranepino de d-ro Zamenhof Margaret Zaleski-Zamenhof. Pavol kaj Rostislav estis premiitaj ankaŭ kiel tiel nomataj "Anĝeloj" de la festivalo kaj transprenis premiojn por la festivalaj urboj Svitavy kaj Nový Jičín (en la video vidu ekde la 46-a minuto). Ĉiujn festivalajn filmojn vi povas spekti [ĈI-TIE](#).

6. Miroslav Smyčka a jeho dvě lásky (M.Smyčka kaj liaj du amoj) - ĈEĤLINGVE

Videoj el la rememora programo en České Budějovice kvaronhora [resumo el la tuta programo](#), registrita de V. Türk, registraĵo de [la parto dediĉita al Esperanto](#).

7. Novaj elŝuteblaj prelegoj de la membroj de la Esperantista Klubo en Brno

[Josef Vojáček - Tra kruca vojo](#) - 13.9.2017

Konciza priskribo de situacio en la 50-aj jaroj de pasinta jarcento, pri persekutado de eklezio kaj arestado, suferado kaj malgloro de pastroj kaj episkopoj

[Oldřich Arnošt Fischer - Ota Pavel](#) - 4.10.2017

Pri la konata ĉeĥa juddevena verkisto (1930-1973), kies pluraj verkoj estis filmigitaj

[Oldřich Arnošt Fischer - Venenaj donacoj de akvaj fontoj](#) - 11.10.2017

Popularscienca prezento de la plej oftaj toksinoj troviĝantaj en la akvo kaj negative influantaj ekz. nutrokvaliton de fiŝoj kaj marestaĵoj ĝenerale

[Miroslav Malovec - Kiel ekestis nova vortaro](#) - 25.10.2017

Pri laboro pri la pli ol 500paĝa Granda Esperanta-Ĉeĥa Vortaro

[Věra Podhradská - El mia esperantista vivo](#) - 1.11.2017

Kun unikaj fotografiaĵoj el la 1950-aj jaroj

8. Nova numero de Praga Bulteno

Klubo de esperantistoj en Prago redaktas trifoje dum jaro propran gazeton, tn. Bultenon.

Tria numero en tiu ĉi jaro estis eldonita marde, la 28-an de novembro 2017! La bulteno estas senpage elŝutebla de [la paĝoj de la bulteno](#).

Oficiala Vizaĝlibra paĝaro de Ĉeĥa Esperanto-Asocio kreskas!

Jam kvar monatoj kaj duono funkcias oficiala Vizaĝlibra paĝaro de Ĉeĥa Esperanto-Asocio. Celo de la paĝaro estas informi vin pri novaĵoj de la esperanta movado en Ĉeĥio kaj en la mondo. La redakcia teamo klopodas preskaŭ ĉiun tagon oferti ion interesan! [Sekvu nin ĉe Facebook!](#)

El aktiveco de Ĉeĥa Esperanto-Junularo

[Ĉlánek o Mezinárodním kongresu mládeže v Togu od místopředsedkyně ČEM Paulíny Lakašové \(Artikolo pri la IJK en Togo de la vicprezidantino de ĈEJ Paulína Lakašová\)](#)



[Nejlepší metody vyučování - informace o novém mezinárodním projektu podporovaném z EU \(La plej bonaj metodoj de instruado - informoj pri la nova internacia projekto subtenata de EU\)](#)

Eventoj

Ni elektas el la plej proksimaj eventoj, kiuj okazos ne nur en Ĉeĥio:

2/12: Zamenhof-Festo

Tradicia [aranĝo](#) okazonta ekde la 16-a horo en „Polnisches Institut“, (Pola Instituto) en 1010 Wien, Am Gestade 7. Tri prelegoj kaj poste bufedo.

3/12: Tosto por Zamĉjo

Festu la JARON DE ZAMENHOF kaj venu partopreni la aranĝeton kun nomo "TOSTO POR ZAMĈJO". La [lasta tosto](#) okazos la 3-an de decembro en Pardubice.

9/12: Antaŭkristnaska Renkontiĝo

Tradicia [aranĝo](#) organizata de la klubo „La Ponto“ Písek.

9/12: Antaŭkristnaska kolbasumado en Saksio 2017

E-mental´ kunlaborante kun dresdenaj esperantistoj invitas vin partopreni [Antaŭkristnaskan kolbasumadon en Saksio](#).

10/12: Ĝenerala Asembleo de Ĉeĥa Esperanto-Junularo

Pinta [aranĝo](#) de Ĉeĥa Esperanto-Junularo, dum kiu oni elektos ankaŭ novan komitaton.

Okazloko:

Prago

15-17/12: 5-a Granda lokŝumado en Bratislavo

[Renkontiĝo](#) de Esperantistoj meze de Bratislavo kun vizito de la Antaŭkristnaska bazaro, gustumado de slovaka specialaĵo "lokŝoj", kristnaska grogo... Festo de Zamenhoftago, promenado, kafumado, teumado, babilado ...

29/12: Esperanta Silvestro

Ekde la 19-a horo en la malgranda salono de la Nacia domo /Národní dům/. Pli detalaj informoj: jk.esperanto@seznam.cz. Kaze, ke vi volas aliĝi, skribu al kovar.lad@email.cz.
Limdato por aliĝoj kaj pagoj: 4.12.2017!

26/12-02/01: JES - Junulara E-Semajno 2017

Tradicia esperanta [aranĝo](#) de junaj geesperantistoj (en kunlaboro de pola kaj esperanto junularoj).

4-7/01: Poludnica 2018

Tradicia – jam [la 36-a! – vintra renkontiĝo de esperantistoj](#) – vojaĝantoj kaj turistoj, nomita laŭ la monto Poludnica en Malaltaj Tatroj kaj organizata de Liptova Esperanto-Klubo.

Se vi volas scii pli pri aliaj eventoj, vizitu [nian paĝon](#) aŭ ankaŭ retejon

[Eventoj.hu](#) - internacian kalendaron de Esperanto-aranĝoj!

Ĉu vi volas aboni ĈEA-Retkomunikojn? Skribu al retkomuniko@esperanto.cz !